



8-6-1974

CGC Nº  
00406 504/1000-06

# Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL

Sede: Edifício Jockey Clube, sala 103  
Setor Comercial Sul

## PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73

Telefone 4-8033

11.100 – Santos (SP)

## SECRETARIA

Caixa Postal 07 – 1182

Telefone 226-1298

70.000 – Brasília (DF)

JUNHO DE 1980

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

BOLETIM Nº 55

Redação: MARIA ALMADA



De maldekstre, S-ro Simo Milojević, reprezentanto de UEA, kaj Senatano José Lins de Albuquerque, prezidanto de la LKK por la 66-a UK okazonta en Brazilio.

## VIZITO DE LA REPRESENTANTO DE UEA AL BRAZILIO

La redaktoro de la revuo "Esperanto", el Rotterdamo, s-ano Simo Milojević, vizitis nian landon. Li venis por pri-trakti la planojn de UEA rilatajn al la venonta jaro en nia lando, t.e., la 66-an U.K.'on, la antaŭkongreson kaj la post-kongresojn okazantajn en Brazilio.

UEA planis organizi la antaŭkongreson en Rio de Janeiro, kiun devus prizonigi ĝiaj du perantoj Kultura Kooperativo de Esperantistoj kaj Brazila Esperanto-



De maldekstre: D-ro Braz Cosenza, S-ino Cedilha Neto, S-ino Maria Almada, S-ro Milojević kaj F-ino Elvira Fontes.

-Ligo. Ĉar la U.K.'on oni okazigos en Brazilio, la postkongresojn oni devas okazigi en Salvador, Rio de Janeiro, Recife, Ouro Preto, São Paulo aŭ aliloke, sed tion oni devas decidi laŭ la deziro de la kongresanoj. En tiuj urboj la turismaj kompanioj zorgos pri la evento, sed nur oni devas havigi ciceronojn kiuj bone scipovas la internacian lingvon.

La 22-an de majo s-ro Simo Milojević konferencis kun la prezidantoj Braz Cosenza, F. S. Almada, Syllas Chaves, Elvira Fontes kaj aliaj ceestantoj en la sidejo de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Rio de Janeiro.

La renkontiĝon kunvokis S-ro Milojević kaj surprizigis lin la harmonia interparolado de la tri prezidantoj. Li klopodis kompreni la "labirintan" movadon en nia lando; li montris nin kiel agadi por la 66-a U.K., por ke ĝi iĝu bona kaj sukcesa.

Por la 66a U.K. respondecas ne nur la Kongresa Komitato en Brazilio, ankaŭ en aliaj urboj loĝantaj esperantistoj, havas la taskon helpi la eksterlandajn viziton-tojn.

Estas tasko por ni ĉiuj kunlabori. Fari difuzam propagandon per naciaj gazetoj, paroli kun la lokaj turismaj kompanioj por presigi afiŝojn kaj prospektojn dulingvajn pri la urbo. Ni disdonos ilin al la eksterlandanoj en la oficialaj bultenoj aŭ kun aliaj dokumentoj. Ĉiu urbo povos havigi eksterlandajn vizitantojn se oni propagandas pri ĝiaj vidindaĵoj.

Jen bona oportuneo por elmontri kio estas Esperanto. Ju pli da propagando despli bone por nia movado.

Prof-rino Elvira Fontes, prezidantino de San-Paŭlo Esperanto-Asocio, informis, ke ŝi organizas kongreson de ILEI-Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj — en Mogi das Cruzes (SP) antaŭ la U.K. — Temas pri interesa evento por la instruistoj kaj kursgvidantoj. Ĉiuj interesatoj volu sin turni al ŝi laŭ la adreso: Caixa Postal n<sup>o</sup> 5.888 - CEP 01.000 - São Paulo, aŭ Av. S. João, 1333, Conjunto 21 - CPE 0.1035.

Multaj el niaj gesamideanoj komprenis la gravecon de la venontjara UK okazonta en Brazilio (FD), ĝi estos certe tre interesa por la Latinameriko, kvankam ĝi okazos en Brazilio.

La movado lastatempe aktivas, ĉar oni okazigis la 1-an Latinamerikan Kongreson, ĉiujare okazigas Seminarion, regionajn renkontiĝojn, kaj BKE ĉijare organizis sian unuan kongreson, tre sukcesan.

- x - x - x - x - x - x -

## QUOTAS PARA O 66º CONGRESSO UNIVERSAL DO BRASIL ATÉ 9-VIII-1980

Categoria 1 - Congressista não membro individual da UEA — Florins . . . . . 125  
Cat. 2 - Membro individual da UEA com livro do ano — Florins . . . . . 103

Cat. 3 - O mesmo com livro do ano e revista — Florins . . . . . 70  
Cat. 4 - Espos(o,a) de congressista da categoria 1 — Florins . . . . . 88  
Cat. 5 - Espos(o,a) da categoria 2 ou 3 — Florins . . . . . 72  
Cat. 6 - Jovens até 20 anos — Florins . . . . . 38  
Cat. 7 - Estudante até 30 anos — Florins . . . . . 63  
Cat. 8 - Cegos — Florins . . . . . 50

Ao pagar sua quota obedeça à taxa de câmbio do dia!

NOTA — Os latino-americanos podem pagar sua quota na moeda do seu país, seguindo a taxa do dia em que remetê-la ao tesoureiro do LKK (Comissão Local do Congresso) Carlos Augusto Siqueira da Cunha — Caixa Postal N<sup>o</sup> 13-2088 — CEP 70.000 - Brasília (DF) — Brasil.

- x - x - x - x - x - x -

## L. K. K. — URGE!

La Kongresa Komitato en Brazilio petas al ĉiuj gesamideanoj komuniki al ĝi ĉu partoprenos la 65-an Universalan Kongreson de Svedlando, kiu intencas alveturi al Eŭropo por la kongreso. Bonvolu informi tuj al la membroj de tiu LKK de la 66-a UK, kiu anticipe dankas.

- x - x - x - x - x - x -

## TRA BRAZILIO . . .

**Fortaleza (CE)** — La junulara organizo el Fortaleza aktivas en tiu urbo. Estas esperantaj kursoj kaj konkurso pri modo por la jaro 1980-a. Ili meritas laŭdojn pro tiel elstara laboro. Gratulinda iniciato!

Prof-ro Paulo Amorim Cardoso daŭre instruas Esperanton per korespondaj kurso ĉe la Federacia Universitato de Ceará.

**Maceió (AL)** — S-ano Alves Mata daŭre batalas en Maceió por nia movado. Li informas, ke li organizas Esperanto-kursojn speciale por instruistoj pri lingvoj, apartenantaj al oficiala reto kaj al privataj lernejoj, patronitaj de D-ro João Azevedo, Rektoro de la Federacia Universitato de Alagoas kaj D-ro José Medeiros, Sekretario pri Edukado kaj Kulturo de la Ŝtato.

Tiu iniciato ebligas en la estonteco la enkondukon de Esperanto en la kursojn de 1-a kaj 2-a gradoj de la Universitato. La kursojn gvidas Prof-ro Geraldo Padua.

Ankaŭ li informis, ke lastmomente estis konsiderita kiel de publika utileco la Alagoana Esperanto-Asocio, laŭ leĝo N<sup>o</sup> 4142, de la 28-V-1980. Gratulon!

**Garanhuns (PE)** — Pernambukana Esperanto-Asocio kunlabore kun Esperanto Klubo de Garanhuns organizas la II-an Nordorientan Esperanto-Renkontiĝon de la 4-a ĝis la 6-a de julio 1980. Patronas ĝin la urbestro, D-ro Ivo Amaral. La gazeto "O Monitor" aperigis grandan artikolon pri Esperanto, verkitan de M.S. Monteiro. Multaj bonaj kaj konataj gesamideanoj klopodas aranĝi la eventon, inter ili la Mag. J. M. Mabesoone kaj Amaro Pinangé Soares, ambaŭ vicprezidantoj de BKE, Janilde Bezerra, prezidantino de la klubo, kaj aliaj diligentaj personoj.

BKE estos reprezentata de s-ano Majoro Gilberto A. Silva Velho, ankaŭ nia vicprezidanto. Ni deziras sukceson al la evento.

**Brazilio (FD)** — Relação de Donativos recebidos em maio/1980:

Valores recebidos em Brasília, pelo Sr. Tesoureiro e escriturados a débito de "Caixa":

#### DONATIVOS PARA A SEDE PRÓPRIA Rec<sup>o</sup>

|                                   |           |
|-----------------------------------|-----------|
| 180-A Godofredo de A. Góes .      | 1.000,00  |
| 181 Francisca Martos . . . . .    | 500,00    |
| 182 Gilberto A. Silva Velho . . . | 500,00    |
| 183 Eugénio Doin Vieira . . . .   | 500,00    |
| 184 Luiz Mário Santos da Silva .  | 5.000,00  |
| 185 Mauro Gomes Azevedo . . .     | 2.000,00  |
| 186 João de Oliveira Gama . . .   | 2.000,00  |
|                                   | 11.500,00 |

#### DONATIVOS PARA O BOLETIM

Rec<sup>o</sup>  
80/44 George Otto Vaske . . . . . 668,10

**Mendoza (Argentino)**



Grupo de gelernantoj de Dragutin Wranka, okaze de diplomiĝo. Oni vidas: Sidanta S-ino Serafina Wranka kaj malantaŭ ŝi staras Prof-ro Wranka.

#### LINGVA PRIKOMENTO

**D.W. - Argentino**

"Gastoj estos senpage akceptitaj" korekte: . . . "senpage akceptataj". "Baldaŭ nia klubo festos ĝian dekjaran ekziston". Oni devas diri "sian dekjaran ekziston". "Tiu packonferenco en 1919 faris grandan maljustecon". La ĝusta vorto estas tie ĉi "maljustaĵon". "Tiu vojaĝo kostos vin 200 dolarojn". La vorto "vin" ne estas bona. Oni diru korekte: "kostos al vi". "Se vi ne jam aliĝis faru tion tuj". Malbona estas la esprimo "ne jam" kaj uzu la ĝustan "se vi ankoraŭ ne aliĝis". "Vi nur devas pagi la sendkoston". La vorto "nur" estas en malĝusta loko. Korekte: "Vi devas pagi nur la sendkoston". "Anstataŭu tiun bildon per unu alia". Korekte: "Anstataŭigu tiun bildon per unu alia". "La ministro konsideris tion sian devon". Tiu ĉi frazo bone komenciĝas sed malbone finiĝas. Korekte: "konsideris tion sia devo" aŭ "konsideris tion kiel sian devon". "Li promenis malrapide la derozpetalojn kovritan vojon". Korekte: . . . "sur la rozpetalaloj kovrita vojo". "Estas multaj, kiuj faris gravajn servojn al nia kaŭzo". En Esperanto la vorto "kaŭzo" signifas nur kialon. Tial la anglan vorton "cause", kiu havas diversajn signifojn, en tiu ĉi frazo ni devas traduki per la vorto "afero" aŭ "movado". La studado de Esperanto estas lernema kaj utila". En tiu ĉi frazo la vorto lernema estas tre malĝusta. Korekte: "lerniga". "Mi estas

militkrimulo". En la lasta vorto la sufikso "ul" estas superflua, ĉar la vorto "viktimo" jam en si mem signifas vivantan estaĵon, do entenas la ideon, kiun la sufikso "ul" esprimas. "En la postmilita rekons-truado tre grava estis la tolerantemeco". La lasta vorto de tiu ĉi frazo suferas en hipertrofio. Sufiĉas diri "toleremo". De tiam forpasis nia amikeco" aŭ "De tiam eksas nia mikeco". Ekde la dua sceno la enketo komencas, kondukata de la juĝisto mem". Ni diru: ... "la enketo komen-cigas kondukata ...". "De tiam forpasis la malnova metodo de propagando" aŭ "De tiam, eksis la malnova metodo ...". "Eks" oni uzas ankaŭ jene: "tiu urbo estas eksa fortikaĵo", ktp. "La klasika temo profunde ŝanĝiĝis". Anstataŭ "La klasika temo profunde modifiĝis". "La junulo estis permesita foriri hejmon". En bona Esperanto oni devas diri: "La junulo ricevis permeson por forlasi la hejmon", aŭ "por foriri el la hejmo".

# **Belo Horizonte (MG)** **"UNU VESTO EBLE BLUA"**

Caio F. Abreu

"Tie mi restis sen iu ajn tuja plano, kiam mi vidis du verdajn viretojn kuran-tajn sur la tapiŝo. Unu el ili elprenis el la poŝo tre malgrandan naktukon kaj surŝovis ĝin sur la frunto. Tiam mi pensis, ke la naktuko estis farita el rafinitaj fade-noj kaj, ke ili eble estas bonegaj teksistoj. Samtempe mi ankaŭ memoris, ke mi be-zonas unu longan veston: unu tre longan veston eble blua. Ne estis malfacile sub-jungi ilin kaj ilin devigi teksi por mi. Ili alportis siajn familiojn kaj dum jarmiloj laboradis. Nekredeblaj katastrofoj: ili enruliĝis en la fadenoj, sufokiĝis meze de la drapo, la kudriloj ponardadis ilin. Sen-nombraj generacioj postvenis. Naskiĝante, teksante kaj mortante. Dum tio mia deks-tra mano ŝvebis minace sur aliaj kapoj".

El la portugala lingvo esperantigis  
Paulo R. Santos - El "ars media" - fe-  
vereiro/77 - publicação FPA - n<sup>o</sup> 200.

**Juiz de Fora (MG)** — Vizitinte tiun ĉar-man urbon ni konstatis, ke s-ano José Mar-cilio instruas Esperanton al pli ol dudek gelernantoj, interesatoj aperintaj post la l-a Kongreso tie okazigita de BKE. S-ano

Marcelio estas tre laborema kaj idealisto, kiu senĉese progresigas la movandon en Juiz de Fora.

- x - x - x - x - x - x -

**Rio de Janeiro (RJ)** — Unu el la plej gravaj gazetoj de Brazilo "O Globo", kiu estas publikigata en tiu urbo, aperigis gravegan artikolon pri Esperanto kaj pri la Esperanto-movado en Brazilo. La in-formojn donis la ĝeinstruistoj Cedilha Neto kaj Sylvio Malheiros. Ambaŭ pri-traktis en sia intervjuo la internacian lin-gvon, informante al legantaro de tiu gaze-to tre detale, elstarigante ĝian valoron en la moderna mondo.

Dum la intervjuo prof-ro Malheiros asertis, ke la internacia ligvo estas bone konta en Brazilo, escepte de Rio de Ja-neiro, kie ĝi estas preskaŭ nekonata pro manko de informoj. Ĝus en la urbo Rio de Janeiro Esperanto ne estas konata, kie troviĝas la du reprezentantoj de la Univer-sala Esperanto-Asocio. Tio estas iom stranga fenomeno, aŭ ne?

- x - x - x - x - x - x -

# **KVARTALA KLUBO EN RIO DE JANEIRO**

Por informi pri Esperanto kaj pri ĝia movado en Rio de Janeiro, la Kopakaba-na Esperanto-Grupo estis organizita de s-ano Elmano Barbosa. En tiu belega ur-bokvartalo s-ano Barbosa intencas oka-zigi kursojn kaj prizorgi ekskursojn por la gelernantoj. Adreso: Hilário de Gou-veia, 66 - Copacabana - Rio de Janeiro.



Majoro Gilberto A. Silva Velho en sia laborejo.

**Caçapava (SP)** — Ni ofte mencias la agmanieron de nia vicprezidanto s-ano Majoro Gilberto A. Silva Velho, kiu fakte tion meritas. Li estas sindediĉa esperantisto kaj tre efika kunlaboranto. Tute elstara ĉie, kie estas bezonata helpo, li aperas kaj serioze agadas.

En la urbo Santos Dumont (MG) malaperis la busto de Zamenhof, starigita de KKE okaze de la II-a Seminario. S-ano Silva Velho rapide agis kaj ĝin trovis, sukcesante promeson de la urbestro restarigi ĝin denove en pli bona loko.

La poresperanta laboro de nia amiko estas laŭdinda. Antaŭ nelonge li vizitis Garanhuns, kie, laŭ lia sugesto, estis starigita la Esperanto-Klubo, kiu okazigas ĉijare la II-an Nordorientan Renkontiĝon de Esperantistoj. Gratulon, s-ano Silva Velho!

- x - x - x - x - x - x -

**San-Paŭlo (SP)** - La prezidantino de San-Paŭlo Esperanto-Asocio, Elvira Fontes, informis nin, ke konstante okazas kursoj en la sidejo de la societo kaj ke estas ankaŭ koresponda kurso, kiun ŝi gvidas.

Prof-ro Walter Francini prelegis pri Esperanto en Bauru, en la lernejo "Sagrada Coração de Jesus", kun granda sukceso.

S-ano Francini estas unu el niaj elstaraj verkistoj, kies librojn oni povas aĉeti en la sidejo de San-Paŭlo Esperanto-Asocio, kie oni trovas ankaŭ eksterlandajn verkojn, krom la libro "Esperanto Elementar" de F. S. Almada. Interesatoj volu sin direkti al tiu organizaĵo: Av. S. João, 1333 - cj. 21 - CEP 01.035.

Prof-ino Elvira Fontes faris paraladon en la sidejo de SESC pri Esperanto kaj nia movado. APE estas unu el la prej grandaj kaj fortaj Esperanto-societoj en nia lando.

- x - x - x - x - x - x -

**Porto Alegre (RS)** - La Esperantista Societo de Porto Alegre kunlabore kun aliaj organizaĵoj okazigos la I-an Sudesperantan Regionan Renkontiĝon, aŭspici-

itan de Brazila Koriŝilantaro de Esperanto, de la tago 19-a ĝis la 22-a de septembro venonta.

La prezidanto de ESPA, s-ano Ernani Dias Corrêa, bonvole akceptis la sugeston de Maria Almada, redaktorino de ĉi tiu bulteno, por organizi la Regionanan Renkontiĝon en tiu suda ŝtato de Brazilo.

Estis elektita ĝenerala kunordiganto nia vicprezidanto kaj amiko D-ro Ivo Sanguinetti kunlabore kun la Esperanto Societoj de Pelotas, Rio Grande kaj gesamideanoj el najbaraj urboj.

La evento celas propagandi pri nia movado kaj precipe pri la 66-a UK en la venonta jaro, okazonta en Brazilio.

**Sorocaba (SP)** - Nia aliĝinta Sorokaba Esperanto-Klubo ankaŭ laboras serioze por aĉeti ŝian propran sidejon. Jam kolektis ĝis nun Cr\$ 22.950,00 kaj, kompreneble, kio ne sufiĉas por aĉeti la sidejon. Oni helpu la laboremajn geesperantistojn el tiu urbo, aĉetante brikojn, kiuj nun estas disvendataj je Cr\$ 350,00. La adreso estas la jena: Sorocaba - Rua da Penha, 455 - Caixa Postal n<sup>o</sup> 234 - CEP 18.100. La estraro antaŭdankas al ĉiuj bonkoraj gesamideanoj.

- x - x - x - x - x - x -

**Santos (SP)** - Recebemos do CENTRO DE CÓPIAS "CERQUEIRA" e agradecemos o seu Informativo. Por êsse seu trabalho ficamos sabendo que a Casa está comemorando seu 10<sup>o</sup> ano de ótimos trabalhos na confecção de impressos de toda natureza com muito capricho e correção. Felicitamos seu proprietário, Sr. Alaôr Cerqueira, que não mede esforços para bem servir sua numerosa clientela. **Ad multus anus!** diz velho ditado latino e é o que desejamos ao nosso amigo Cerqueira e à sua valorosa equipe de auxiliares. Parabéns!

- x - x - x - x - x - x -

## ĜENERALA ALVOKO

En la venonta jaro okazos la 66-a U.

K. en Brazilio, la unua en nia lando, kaj en la suda hemisferio. Kiom da esperantistoj partoprenos? Ĉu mil? ĉu mil? ĉu mil? Pri la tuta nombro ni ne povas precize influi, sed pri la nombro de la brazilaj kongresanoj ni ja povas influi. De komece ĉiu el ni devas inviti la membrojn de niaj Esperanto-societoj, la esperantistojn de ni konatajn; ne nur inviti, sed instigi ilin aliĝi tuj dum la speciala periodo (ĝis la 9-a de aŭgusto), pagante la plej malaltajn kotizojn. Aliĝu kaj partoprenu la kongreson! Tiamaniere ni sukcesos venigi al Brazilio la prej grandan nombron da esperantistoj. Certe venos sufiĉe granda nombro el Eŭropo kaj el aliaj kontinentoj, kio elstarigos la eventon.

En la lastaj jaroj Brazilo fariĝis pli bone konata en la tuta mondo, ĉu pro ĝia rapida progreso, ĉu pro la inaŭguro de speciale konstruita kaj tre moderna ĉefurbo: Brazilio. Kaj la atento de la tuta mondo celas nian landon. Tial do ni kredas, ke vanos multaj esperantistoj, kiuj certe renkontos multajn enlandajn gesamideanojn por ilin akcepti kaj doni informojn pri nia lando, kaj interparoli, ebligante la funkciadon de Esperanto.

Ni devas inviti ankaŭ niajn geamikojn ne esperantistajn aliĝi kaj partopreni la kongreson por ke ili vidu kiel funkcias la internacia lingvo, kiel kompreniĝas homoj diverslingvanaj, kiel interfratiĝas malsamreligiaj kredantoj, kiel interamikiĝas diversgentanoj. Estas unika oportuneco montri al niaj geamikoj la eblecon de la lingvo-ponto. Oni devas tuj aliĝi, profitante la malaltajn kotizojn kaj ankaŭ povas lerni Esperanton sufiĉe por kompreniĝi sin dum la evento.

Ĝenerale ses monatoj estos necesaj por lerni la sufiĉon por interrilatiĝi kun la vizitontoj, sed se oni volas, kompreneble, partopreni la Internacian Universitaton, estos necese trastudi pli profunde la lingvon.

Do invitu ni niajn amikojn kaj parencojn, ke ili venu al Brazilio ĝui la kunvivadon de homoj el pluraj landoj. Ĉiu homo treege ŝatos vidi per siaj okuloj kaj aŭdi

per siaj oreloj la funkciadon de vere internacia helplingvo.

Eluzu tiun gravan eblecon!

Samideano.

- x - x - x - x - x - x -

## NONO RICEVITA POR LA BULTENO

Ni ricevís kaj dankas:

|                                                      |               |
|------------------------------------------------------|---------------|
| De Waner Marliere Arruda                             | Cr\$ 200,00   |
| Claudio Zimmermann . . .                             | Cr\$ 150,00   |
| Antonio Felis da Silva . . .                         | Cr\$ 100,00   |
| Nelson Bernardo (por la kampanjo de la sidejo) . . . | Cr\$ 1.000,00 |

- x - x - x - x - x - x -

## GAZETOJ RICEVITAJ

Correio Fraterno da ABC, Suda Ste-lo, Boletim de Alagoas, O Lider, A Nova Era, Rio Grande, O Globo, O NO. SSo, O Monitor, Destaque, O Caminho, kaj Brazila Katoliko. Boletim Informativo de San-Paŭlo Esperanto-Asocio-Abril/Maio, 80, trazendo muitos informes de grande valia para o movimento. Congratulamos-nos com a diretoria da APE pelo Informativo desejando vida longa ao seu trabalho.

- x - x - x - x - x - x -

## REDENÇÃO

Eleus L. de Sá

Falamos lingua diversa,  
Castigo por ambição.  
Tempo de vida pregressa  
De doce recordação.

Querendo com toda pressa  
Atingir o proibido  
Deus então prá cortar essa  
Confunde nosso sentido.

Porém avisa o profeta,  
Assim indicando a seta,  
Na profecia de um santo.

Se unirão todos um dia,  
Quando com muita alegria  
Estudarem ESPERANTO.

## LA OKERA VOJO

L' Okera Voj' al paco estas tia:  
Kun tre diversaj gradoj de kruteco,  
Per rapideco laŭ l' anima forto,  
Grimpados ĉiuj ĝis la neĝ-heleco.

L' una ero estas Prav-Doktrino.  
Respektu Darmon, marŝu evitante  
Ofendo, atentante Karmon, kiu  
La sorton faras, sentojn superante.

La dua estas Prava Cel'. Vi estu  
Al ĉiuj kiuj vivas, bondezira,  
Lasante morti ĉian malbonecon;  
Similu via viv' al vent' zefira.

La tria estas Prav-Parolo. Zorgu,  
Ke ĉiam estu bonaj kaj ĝentilaj  
La vortoj elirante la lippordojn,  
El, kvazaŭ, la ĉeest' de Reĝ', trankvilaj.

La kavara estas Prav-Kondukt'. Per agoj  
Kreskiĝu bono, kulpoj forvelkiĝu:  
Kvazaŭ arĝenta ŝnur' tra kristalgloboj,  
En bonaj agoj amo tramontiĝu.

Hermann Schröder

## LASTMOMENTE!

Ĉar okazos en la Sudo de Brazilo, cetere en la bela urbo Porto Alegre (RS), iu speciala renkontiĝo esperantista, la aliĝo al tiu kunsido estas insiste petata por ke oni elmontru la progreson de la movado ankaŭ en tiu regiono. La aliĝkotiĝo dum julio kostas Cr\$ 200,00 kaj post tiu dato ĝi kostos Cr\$ 300,00. La kunordiganto: D-ro Ivo Sanguinetti. Oni sendu la kotizojn al Itamira Gomide — Rua dos Andradas, 1137, conj. 1704 — CEP. 90.000 — Porto Alegre (RS), ĉu per ĉeko aŭ poŝtmandato. Ke ĉiuj regionoj de Brazilo

kuniĝu en la sudo de la lando estas nia sicera deziro.

- x - x - x - x - x - x -

## SANTO ANDRÉ (SP)

La 22-an de junio pasinta la geedzoj Almada estis invititaj de la Familio Dias Pinto, konata esperantisto kaj vicprezidanto de BKE, partopreni familian tagmanĝon ĉe ili.

La etoso estis la plej agrabla ĉar ĝin partoprenis ankaŭ Mariza, filino de la gastigantoj, kaj sia edzo Luiz; Alvaro ankaŭ filo de la invitintoj, kaj s-ino Anna, patrino de Dias Pinto.

La tuta familio parolas Esperanton kaj la gefiloj Mariza kaj Alvaro estas denaskaj esperatistoj.

S-ino Amelia, pere de sia kuirarto kaj simpatio riĉigis la vere festivan renkontiĝon.

S-no Dias Pinto informis, ke li ne plu gvidos la kulturkunvenon en APE pro lia troa okupateco. Transprenis la taskon s-ano João Masiero.

La tago finiĝis en tre amika kaj vere esperanta etoso.

- x - x - x - x - x - x -

## ASOCIO ESPERANTISTA DE RIO DE JANEIRO

Estis fondita la 30-an de marto de 1942, kiu multon faris jam por nia movado, sed lastatempe ne funkciis.

En tiu ĉi jaro tri zorgemaj gesamideanoj kunvenis kaj decidis restarigi la societon en Rio de Janeiro. La komisiono konsistiĝas jene: F-ino Yolanda Evangelista da Silveira, prezidanto d-ro Bento Pires da Rosa Filho kaj s-ro Delio Pereira de Souza, kasisto, kiuj faros la necesajn paŝojn por kunvoki asembleon kaj elekti novan estraron.

La komisiono invitas ĉiujn esperantistojn aliĝi al la restarigota societo por helpi ĝian ekfunkciadon.

Ni ja ĉiuj konscias, ke sen necesa apogo la societo ne povas funkcii kaj ni petas ĉiujn helpi al la societo restarigi. En la nomo de la komisiono ni anticipas dankas la kunlaboradon.

**UNUA INTERNACIA KONKURSO PRI TROBOJ  
(KVARVERSOJ)  
ORGANIZITA DE SAN-PAULO ESPERANTO-ASOCIO  
(BRAZILIO)**

San-Paulo Esperanto-Asocio okazigas sian Unuan Internacian Konkurson pri Troboj (Kvarversoj), laŭ la jena Regularo:

1. Oni konsideras trobo la poemeton kum kvar oksilabaj versoj, en kiu la unua verso rimigas kun la tria, kaj la dua kun la kvara. La kvar versoj aŭ estu ĉiuj kvartrokeoj (ĉefakcentoj sur la tria kaj sepa silabo), aŭ ĉiuj oksilaboj (ĉefakcentoj sur la kvara kaj sepa). Ekzemple:

Por la venki' de Esperanto  
iru ni al la labor!  
Sur la lipoj - varma kanto,  
firma kredo - en la kor!

Ho! Sankta Niĉjo, tardiĝas  
la poŝta servo al vi...  
Multaj letoroj perdiĝas...  
Multaj povruloj sen i'...

2. La troboj estu ankoraŭ nepublikigitaj
3. Ĉiu ajn rajtas partopreni la Konkurson, sendepende de aĝo, instrunivelo aŭ antua literatura sperto.
4. Temo: FRATECO.  
Ne estas devige uzi la temon vorton aŭ aludi la kunfratigan karakteron de Esperanto.
5. Ĝenroj de la troboj: filozofia aŭ lirika.
6. Ĉiu konkuranto povas partopreni per maksimume kvin troboj. Ĉiu trobo estu tajpita sur la ekstera antaŭa flanko de malgranda koverto (8cm: 11 cm proksimume). Super la trobo estu skribita la temo kaj sub la trobo nur la nomo de la lando el kie ĝi venas (se ĝi venas el Brazilo, necesas indiki la ŝtaton; se la trobo venas el la urbo San-Paulo, oni skribu: "urbo San-Paulo"). En tiun koverton la konkuranto metu paperpecon kun la jenaj informoj: nomo, adreso kaj subskribo de la konkuranto. La malgranda koverto estu fermita kaj metita en pligrandan koverton sur kiu oni skribu:

**UNA INTERNACIA KONKURSO PRI TROBOJ (KVARVERSOJ)  
ORGANIZITA DE SAN-PAULO ESPERANTO-ASOCIO**

Av. São João, 133 - Conj. 21  
01035 — SÃO PAULO — S.P. — BRAZILIO

Oni ne skribu la nomon kaj la adreson de la sendanto.

7. La limdato por la sendo de troboj estas 1a 15a. de Septembro 1980. Oni konsideros nur la trobojn alvenintajn ĝis tiu dato.
8. La troboj sendotaj de esperantistoj loĝantaj en la urbo San-Paulo estos juĝitaj de komitato de esperantistoj loĝantaj en alia brazila urbo. La troboj sendotaj de ekster Brazilo aŭ de aliaj brazilaj urboj ol la urbo San-Paulo estos juĝitaj de komitato de esperantistoj de ĉi-lastata urbo.
9. Premioj: medaloj, libroj kaj diplomoj liverotaj en soleno okazonta la 15-an de Decembro 1980 (entute 19 medaloj, 25 libroj kaj 56 diplomoj). La premioj aljuĝotaj al esperantistoj loĝantaj ekster San Paulo estos senditaj per poŝto.
10. La troboj sendotaj ne estos resenditaj kaj San-Paulo Esperanto Asocio rezervas al si la rajton ilin publikigi iam ajn.
11. La rezultato de la Unua Internacia Konkursito pri Troboj estos publikigita en gazetoj de San-Paulo kaj esperantaj periodaĵoj.

- x - x - x - x - x - x -